

Manfred Hausmann,

Adiaŭ

tradukita de Manfred Retzlaff

Ĉe l' pord' ĉe l' flava gruo diris li
adiaŭ je la lasta foj'.
Aprilo estis kaj la vel-boat'
forglitis sur la akva voj'.

La velon mi ankoraŭ vidis jen,
ĝis en la blu' foriĝis ĝi,
kaj poste nur la larĝon de l' river',
trembrilon sole vidis mi.

*Traduko de la Germana poemo "Lebwohl" de MANFRED HAUSMANN (*1898-09-10 – †1986-08-06) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04).*

Arg-903-1802 (2013-06-29 11:50:59)